



## Venontaj eventoj

☞ **Hodiaŭ** ☞

- ★ **2:00 pm:** Steĉjo prelegos pri la mistera libro *Codex Seraphinianus*.
- ★ **7:30 pm:** Vegana bakfesto. Chris kaj Hoss bakos por vi freŝajn dolĉaĵojn, kiujn vi povos ornamati (kaj poste manĝi!)

## Ĵaŭdo

- ★ **2:00 pm:** “Ĉu ni solas?” Amri prelegos pri eksterteranoj.
- ★ **7:30 pm:** Diplomceremonio en AP&M 4301.

## Vendredo

- ★ **pm:** La kursaro oficiale finiĝos tuj post la matenaj klasoj. Por tiuj, kiuj restos ĝis sabato, ni provos organizi neformalajn eventojn. Ĉu vi havas proponojn?

### La NASKa Fasko

Redaktejo: Asante n-ro 116  
nask.esperanto@gmail.com

La NASKa Fasko aperas lunde – vendrede dum la kursaro. Kutime ĝi aperas tagmeze. Se vi ne ricevas ĝin post la matenaj klasoj aŭ en la manĝejo, prenu ekzempleron el la skatolo kiu troviĝas sur la fenestro de la redaktejo.

Ni avide atendas viajn artikolojn, fotojn, desegnaĵojn, bildstriojn, poemojn, viajn am-leterojn... preskaŭ ion ajn! Memoru, la Fasko estas taggazeto **por vi kaj pri vi**: viaj kontribuajoj igas ĝin interesa. Do nepre kontribuu!

Se vi ne sentas vin tute kompetenta pri verkado, ne timu; ni volonte helpas vin korekti kaj poluri. Serĉu unu el niaj lingvo-helpantoj; sur siaj nomŝildoj ili portas specialajn glumarkojn kun rideto (☺) – kaj ili ridetante helpas vin korekti, poluri, kaj plibonigi vian verkon. Kiam la verko pretas, sendu ĝin per retpoŝto al la adreso supre, aŭ simple portu ĝin piede al la redaktejo.

## Sekretoj de la *Codex Seraphinianus*

La kodekson *Seraphinianus* verkis kaj ilustris la itala artisto/arĥitekto Luigi SERAFINI inter 1976 kaj 1978. La 360-paĝa libro estas verkita en nekonata lingvo, kiu ĝis nun restas nedecifrita. Troveblas en ĝi bildoj jen amuzaj, jen groteskaj, sed preskaŭ ĉiam spritaj kaj pensigaj.

Steĉjo prezentos la misteran libron kaj provos malkaŝi kelkajn sekretojn pri ĝi kaj ĝia strukturo.



Du paĝoj el la kodekso

## Dori salutas nin



Dori varbas eĉ en la malsanulejo! Si devas resti iom pli longe por observado, sed ŝi espereble baldaŭ revenos al la klasĉambro. Intertempe ŝi konstante laŭdas Esperanton kaj la ĉi-jarajn lernantojn.

Baldaŭ ĉiuj ĉe la malsanulejo verŝajne salutos unu la alian per “Saluton!”

## Hodiaŭ vespere: Chris kaj Hoss bakos vegane



*Veganoj* estas homoj kiuj rifuzas senbezzone mortigi aŭ suferigi sento-havajn bestojn. Preskaŭ ĉiuj bestoj en Usono breditaj kaj ekspluatitaj por manĝaĵo vivas mizere kaj mortas terure. Ĉe vastaj “fabriko-bienoj” ili pasigas siajn tutajn vivojn en etaj kaĝoj sen spaco por piediri, turniĝi aŭ eĉ komferte kuŝi. Homoj kripligas la bestojn per kastrado, brulmarkado, fortranĉo de piedfingroj, vostoj, kaj aliaj sentemaj korpopartoj – sen ajnaj sendoloriloj.

Verŝajne la plej mizera el la bienobestoj estas la kokino uzita por produkti ovojn. Kompreneble, kokinoj nature demetas ovojn senprobleme. Sed 98% de la ovojn vendataj en Usono venas de kokinoj en ege nenatura stato. La usona kokino pasigas ŝian tutan vivon en drata kaĝo kun ses aliaj birdoj; ĉiu vivas en spaco malpli granda ol tiu ĉi paperfolio. Proksimume dekono de la kokinoj, kiuj ne povas elteni la suferon

kaj simple mortas, inkluzivigas en la kosto de produktado.

La ovproduktaj kokinoj estas breditaj nur por produkti ovojn; ne estas profitdone uzi ilin por viando, ĉar ili ne kreskas sufiĉe rapide. Tial la virkokidoj, profite senvaloraj, oni simple mortigas. En Usono proksimume po 200 milionojn da kokidoj jare oni sufokas aŭ metas en pecetigilojn dum ili estas ankoraŭ plene konsciaj.

Feliĉe, eblas vivi tute sane (kaj sate!) sen bestaĵoj. Venu ĉi-vespere kaj kaj provu senkruelajn veganajn dolĉaĵojn – sen ovojn!



Kokinoj en kutima usona ovproduktejo

## Kiel baki sen ovoj?

Multaj bakajoj simple ne bezonas ovojn, sed ankaŭ eblas “veganigi” ne-veganajn receptojn. Jen kelkaj ingrediencoj, kiuj en bakajo egalas al unu ovo:

- **Ener-G Egg Replacer:** pulvoro farita el terpom-amelo. Trovebla ĉe grandaj manĝaĵo-varejoj, ekz. Whole Foods. Kunmiksi 1¼ tekulerojn (6 ml) de la pulvoro kun 2 serv-kuleroj (30 ml) da akvo.
  - **Frukto:** kunmiksi ½-tekuleron (3 ml) da bak-pulvoro kun ¼-tason (60 ml) da kaĉigita frukto.
  - **Tofuo:** verŝu la akvon el bloko de molstila tofuo kaj bone kunmiksi ¼-tason (60 ml) de la tofuo kun ½-tekuleron (3 ml) da bakpulvoro.
  - **Linosemoj:** pulvorigu 1 servkuleron (15 ml) da semoj en miksĝilo. Aldonu 3 servkulerojn (45 ml) da akvo kaj miksu ĝis la likvaĵo fariĝas viskoza.
- **Kaj kompreneble, konvenas bananoj!** Duon-banano sufiĉas por unu ovo.

## Bananopano!

- ⅓-taso (80 ml) da bruna (kruda) sukero
  - ⅓-taso (80 ml) da blanka (rafinita) sukero
  - ⅓-taso (80 ml) da margarino, moligita
  - 3 maturaj bananoj, kaĉigitaj
  - 2 tasoj (475 ml) da faruno
  - ½ tekulero (2.5 ml) da natria hidrokarbonato
  - ¼ taso (60 ml) da vanila sojlakto miksita kun 1 tekulero (5 ml) da cidrovinagro
  - 1 tekulero (5 ml) da eltiraĵo de vanilo
  - 1 tekulero (5 ml) da cinamo
  - ¼ tekulero (1 ml) da pimento
  - ½ tekulero (2.5 ml) da salo
  - ½ taso (120 ml) da juglandopecoj
1. Varmigu bakforonon ĝis 350 °F (177 °C). Oleigu 8 x 4" (20 x 10 cm) panpaton per margarino.
  2. Kunkribu la farunon, la natrian hidrokarbonaton, salon, kaj spicojn.
  3. Kune kremigu la margaron kaj sukeron. Aldonu bananojn, sojlakton kaj vanilon.
  4. Bone miksu la sekajn ingrediencojn en la malsekajn. Verŝu la bataĵon en la panon. Dise faligi juglandojn sur la supron, kaj baku unu horon aŭ iomete pli.

Adaptita el recepto de Isa Chandra Moskowitz de Post Punk Kitchen




## Ĉu ni solas? Interstela komunikado kaj 50 jaroj da SETI (dua parto)

de Amri WANDEL (La unua parto de la artikolo aperis en n-ro dek unu de la Fasko.)

### Natura aŭ artefarita signalo?

Serĉante signalojn de la kosmo, ni unue devas zorge certigi, ke la radio-signaloj, kiujn ni ricevas, ne venas el surteraj fontoj, kiuj ja abundas: regulaj radiofoniaj kaj televidaj elsendoj, radaro, navigiloj kaj komunikiloj de civilaj kaj armeaj aviadiloj kaj satelitoj ktp. Eĉ se la ricevita signalo venas el ekster-tera fonto, ĝi povas esti natura fenomeno, kaj ne komunikaĵo de alia civilizacio. El la kosmo alvenas multaj radio-ondoj el naturaj fontoj: nia Suno, aliaj steloj, interstela gaso kaj galaksioj.

Kiel distingi inter radi-ondoj de natura fonto de inteligentaj signaloj? Supozeble la



signaloj, kiuj venas de iu civilizacio, havas certan strukturon kaj estas iusence regulaj, kontraŭe al la arbitreca bruo, kiu venas de naturaj fontoj.

### Frekvenco


Same kiel hejma radio-ricevilo, ankaŭ radio-teleskopoj povas ricevi ondojn en plej diversaj frekvencoj aŭ ondolongoj. Kiun frekvencon uzi por serĉi signalojn de alia civilizacio? Ekzistas preskaŭ senfina nombro da ebloj! Baza kondiĉo estas, ke la natura radio-bruo estu kiel eble plej malalta, kaj ke nia atmosfero estu travidebla al ondoj kun tiu ondolongo. Tiuj kondiĉoj limigas nin al ondolongoj de 3–100 cm (frekvencoj de 1–10 GHz).

Ankaŭ ene de tiu regiono ekzistas multegaj ebloj, kaj estas malverŝajne, ke inteligenta civilizacio malŝparos sian energion elsendante en ĉiuj frekvencoj! Tamen, ekzistas frekvencoj, kiuj estas kvazaŭ universale signifaj: la frekvencoj ligitaj al atomaj energi-ŝtupoj de kosme abundaj elementoj. La plej elstara el tiuj estas la baza frekvenco de la hidrogena atomo – la plej abunda materialo en la kosmo. Tiu frekvenco estas 1420 MHz (kiu korespondas al ondolongo de 21 centimetroj). La ondolongo-regiono ĉirkaŭ 21 cm (kiu en la

profesia jargono nomiĝas “la akvo-truo”) havas la kroman avantaĝon, ke en ĝi la interstela spaco estas travidebla kaj tre kvieta, do oni povas sendi kaj ricevi trans grandaj distancoj kun minimuma interveno de natura radio-bruo. Supozeble ankaŭ la eksterteranoj konas tiujn sciencajn faktojn kaj uzas la samajn argumentojn por elekti tiun ondolongon por interstela komunikado.

### Komunikado kun eksterteraj civilizacioj

Kiel povus aliaj civilizacioj ekscii pri nia ekzisto, kaj ĉu eblas interstela komunikado kun ili? (Legu la trian parton, morgaŭ!)



La mesaĝoplato sur Pioneer 10 kaj 11